

PILGRIMLOKO KLOKOTY

Historio

Sudbohemia pilgrimloko Klokoty situas en norda urborando de la urbo Tábor, el kies centro tien direktas tra valo de rojo de Tismenický tilia aleo. Jam ekde la 13-a jarcento estas en tiuj lokoj menciita kasteleto de sinjoro Vitek el Klokoty, ĉe kiu staris preĝejeto. Unuan skriban registraĵo pri la preĝejo oni trovas pli poste ĉe nomo de loka paroĥestro Bolech en la jaro 1361.

Klokoty, etendiĝantaj surroke super rivero Lužnice, ricevis nomon aŭ laŭ son-lirlanta malnovslava esprimo por fluanta akvo en la rivero, aŭ kiel mencias aliaj fontoj, laŭ pli antaŭe multe kreskantaj stafileaj arbustoj. En la preĝejo troviĝas dokumentita ĝia konsekro al Ĉielenpreno de la Virgulino Maria el la jaro 1389. Laŭ legendo ĝuste tiutempe Madono en aspekto de belega junulino aperis unue al paŝtistetoj kaj poste ankaŭ al ceteraj lokaj homoj. Ŝi ilin instruis pri Dio kaj poste antaŭ iliaj vidoj Ŝi estis per anĝeloj enportita ĉielen. Tiun scenaron bildigis hodiaŭ nekonnata pentristo el Sezimovo Ústí kaj por la bildo la lokanoj konstruis super fonto ĉe Dobrá Voda (Bona Akvo) kapelon. Tiun ĉi lokon komencis vizitadi pilgrimantoj, kaj tial estis konstruita malgranda preĝejo, laŭdire mil paŝojn oriente de la kapelo, por ke ne estu difektita fonto, al kiu estis jam antaŭ aperokazaĵoj atribuatataj miraklaj efikoj.

Nek lokon Klokoty evitis husanaj militoj, la kapelo estis ruinigita kaj apud paroĥa domo estis en la jaro 1421 brulmortigitaj ĉirkaŭ 50 anoj de adamit-sekto. Unua informo pri konstruo de nova kapelo sur originaj ruinaĵoj devenas el la jaro 1520, kiam legendo mencias pri trovo de nedifektita origina bildo de la Virgulino Maria. Fine de la 17-a jc. civito Tábor vendis Klokoty al ordeno de benediktanoj el Monserrat kaj ilia superioro Didaco di Convero komencis en la jaro 1701 kuraĝan alikonstruon ĝis aspekto, en kiu la pilgrimloko hodiaŭ troviĝas. Estis konstruita preĝeja navo, pluaj du flankaj kapeloj,

la preĝejo estis ĉirkaŭita per klostra galerio kun kapeloj en anguloj kaj en suda parto estis alkonstruita rezidejo. Benediktanoj estis dum konstrulaboroj el la loko forvokitaj kaj la klostron transprenis denove civito de Tábor, sed la konstruo povis plu daŭrigi danke al donacoj de la ubanoj de la urbo Tábor kaj mecenatoj de gravaj nobelaj gentoj.

La loko ekde la komenco estas kunigita kun pilgrimoj al la Virgulino Maria; la ĉefpilgrimo ĉiam okazas en plej proksima sabato al la festotago de la Ĉielenpreno de la Virgulino Maria (15-an de aŭgusto).

Altarbildo de la Virgulino Maria

Ĉi estas centra elemento de la pilgrimloko. Ĝia frubarokstila aspekto devenas el farejo de praga pentristo Johann Andreas Burger el la jaro 1636. En la jaro 1743 estis la bildo lokigita sur la arĝentan altaron pretigitan de juvelisto Francisko Seitz, kiu estas kromalie aŭtoro de tomba monumento de sankta Johano Nepomuka en praga katedralo de s-taj Vito, Adalberto kaj Venceslao. Tipe apartenas la bildo al t.n. „spikformaj Madonoj“, tiel konataj laŭ grenspikoj, ĉi tie laŭ ŝosoj, dissemitaj sur festa vesto de Maria. Tiun ĉi tipon de bildigo laŭ modelo de arĝenta statuo de Madono en Milano el dislimo de la 13-a kaj la 14-a jc. oni povas vidi en pluaj lokoj de la meza Eŭropo.

Preĝejo de la Ĉielenpreno de la Virgulino Maria

Pri aspekto de origine simpla gotika preĝejeto ekzistas neniuj informoj. Post konstruo el komenco de la 18-a jc. memorigas horizontala projekciaĵo formon de dulatera kruco. Al rondforma fundamento de la preĝejeto estis alkonstruita preĝejnavo, super originaj kapeloj apud presbiterejo estiĝis oratorioj kaj ĉe navflankoj du grandaj flankaj kapeloj. Arkivaj dokumentoj atestas, ke la konstruadon gvidis konstruisto el ne malproksima Ratibořské Hory.

Plafono super ĉefaltaro havas volbitan kupolon, kiu estas riĉe ornamita per stukajfoj kun bildoj prezentantaj Naskiĝon de la Sinjoro, Forkuron en Egiptujon, Edziĝfeston en Kana Galilea kaj pluajn scenojn en bibliaj okazintaĵoj. En surskriboj sub bildoj estas kaŝita ĥronogramo indikanta ekeston de la konstruverko (1707 kaj 1708). El presbiterio eblas eniri en flankajn kapelojn, kiuj nuntempe estas eluzataj kiel sakristioj, oratoriojn super ili dediĉis en la jaroj 1708-1709 loĝantoj el Hodĉjov kaj famiario Bechynĉ el Lažany. Presbiteriejo kaj navo estas apartigitaj per arko ornamita per statuo de pieto, super kiu estas blazono de patro-
no de la sanktejo – la urbo Tábor. Flankaj altaroj de sanktaj Barbara kaj Dorota apud la arko estiĝis danke al familio de Deym el Střitež. Merite de gento Lobkowicz ekestis granda kapelo de s-ta Jozefo, la suda kapelo de s-ta Venceslao ekstis merite de gento Schwarzenberg. Altaro en tiu ĉi kapelo estis komence de la 20-a jc. kompletigita per statuoj de s-taj Cirilo kaj Metodjo, s-ta Agnesa la Ĉeĥa kaj s-ta Ludmila. Plafono en la preĝeja navo ornamita en la jaro 1892, bildiganta Anunacion, Ĉielenprenon kaj Viziton de la Virgulino Maria, estas kompare kun plafonoj en flankaj kapeloj surprize plata. Ĥoruso, predikejo kaj preĝejaj benkoj devenas el la jaro 1720. En antaŭa parto de la preĝeja navo altiras atenton granda tomba ŝtono, kiu fermas kripton konstruitan en la jaro 1746 por entombigo de lokaj pastroj.

Klostra konstrukomplekso

Spacon ĉirkaŭ la preĝejo ĉirkaŭas tegmentitaj, internen malfermitaj koridoroj, t.n. klostraj galerioj, kun okeĝaj kapeloj en anguloj, kiuj estas same kiel sur la preĝejo finitaj per kupoloj kun cepformaj turgloboj, turoj estas en la komplekso de la konstruaĵoj entute dek. Klostragaleriaj kapeloj estas kvar sanktigigitaj honore al s-ta Anna, s-ta Laŭrenco, s-ta Adalberto kaj Virgulino Maria Rozaria. Dekoraciaĵoj de la kapeloj bildigas scenaĵojn

el la vivo de tiuj sanktuloj sur altarbildoj ĉe sur stukaj ornamaĵoj de la plafonoj, simile kiel en la flankaj preĝejaj kapeloj.

Jam el tempo de konstruado de la pilgrimloko devenas vastdimensiaj duonlunaj bildoj ekspoziciitaj en okcidenta klostra galerio. En ilia meza parto troviĝas scenoj el vivo de Kristo, maldekstra parto enhavas scenojn el Malnova Testamento kaj sur la dekstra parto estas bildigitaj scenoj el vivo de s-ta Johano Nepomuka. Ĝuste al li estas en tiu ĉi parto dediĉita niĉa kapeleto. Sur tiu ĉi flanko de la klostro estas ankaŭ enirejo al loka tombejo.

Kapeloj kaj klostraj galerioj, konstruitaj je kostoj de lokaj urbanoj en la 20-aj ĝis 30-aj jaroj de la 18-a jc., proponas al pilgrimantoj ripozon, ombbron kaj elrigardon al roza ĝardeno. Suda parto de la klostraj galerioj estis kompletigita en la jaro 1743 per konstruo de rezidejo, kiu de tiu tempo estas loĝejo de ekleziaj administratoroj. Sonkulison de Klokoty formas ĥoralo de sonoriloj kaj sonoriletoj, kiuj estas tie entute dek. La plej malnova estis fandformita en la jaro 1508, la dua jarcenton post ĝi, pluaj aldoniĝis en la jaro 1980. Unu el pli malnovaj sonoriloj estis en 90-aj jaroj de la psinta jarcento konsekrita al Eugène de Mazenod, fondinto de Ordeno de Misiistoj Oblatoj de la Plejsankta Maria Senmakula.

Misiistoj Oblatoj de la Plejsankta Maria Senmakula

Novtempa historio de la monaĥejo de Klokoty estas de la jaro 1994 ligita kun kongregacio de Misiistoj Oblatoj de la Virgulino Maria Senmakula. Slovo „oblato“ havas latinan devenon kaj estas klarigata kiel oferita al Dio. Ĉefa misio de la Kongregacio estas laŭ deziro de ĝia fondinto Eugène de Mazenod (1782-1861) ĉeestado inter la plej forlasitaj homoj kaj per sia ĉeesto kaj praktika helpo montradi al la homoj Kriston. Kvin mil membroj hodiaŭ helpas en sepdek landoj. Laŭ modelo de Jesuo, kiu ne venis,

por sin lasi priservi, sed por servi, ankaŭ misioj de oblatoj havas multajn formojn, kiuj enhavas kiel specifan atenton protekti infanojn kaj malfortulojn, vundeblajn homojn, sed ankaŭ por perigado de dialogo inter diversaj religiaj konfesioj. Grava estas ankaŭ ilia agado en internaciaj organizacioj kaj ĉe Unuiĝintaj Nacioj, kie ili klopodas pri justeco kaj kreo de tiaj kondiĉoj, kiuj ebligus, ke la voĉo de malriĉuloj atingu tion, kie oni decidas pri iliaj vivoj. En Klokoty aktivus ili ankaŭ kiel administratoroj de loka paroĥo, kio inkluzivas ankaŭ zorgon pri rekonstruado de la pilgrimloka konstruokomplekso klopodante ĝian konservon en aŭtenta stato ankaŭ por pluaj generacioj.

Samtempeco

Hodiaŭ en Klokoty vivas paroĥa komunumo, kiu kolektiĝas dum regulaj diservoj ĉiutage kaj dimanĉe. Sian lokon kaj aktivadojn tie havas ĉiuj aĝkategorioj. Ĉe solenoj ĉeestas preĝeja koruso, unu dimanĉa sankta meso estas dediĉita al infanoj kaj al familioj kun infanoj. Infanoj tie kolektiĝas ankaŭ dumsemajne por instruo de religio, plue dum someraj tendaroj, semajnfinaj renkontiĝoj ktp. Paroĥanoj mem formas internan medion por praktika eĉ teknika funkciado kiel de la klostra konstruokomplekso, tiel ankaŭ por prizorgo de proksime situanta pilgrimdomo

Emauzy (estinta lernejo). Al Klokoty oni povas veni por aŭskulti prelegon pri familia, misia aŭ aliteme direktita temo, dum semajnfinaj tagoj ekzistas ebleco partopreni spiritaĵajn programojn, peti pri spirita interparolo, bapto aŭ geedziĝo aŭ simple veni por ripozo. Pri regulaj kaj aktualaj aktivadoj en la paroĥo ekzistas informoj en www.klokoty.cz.

Krucvojo al lapeleto de Dobrá Voda (Bona Akvo)

Agrabla promeno same kiel riĉiga pilgrimo povas esti krucvojo de Klokoty, kies nuna aspekto devenas el la jaro 1866. Formas ĝin 14 stacioj kun ĝis hodiaŭ konservitaj polihromitaj bildoj de pentristo el Tábor Antonín Hála. La krucvojo komenciĝas ĉe orienta enirejo de la pilgrimloka konstruokomplekso, plue ĝi trairas tilian aleon direkten malsupren ĝis kapeleto de sankta Johano Nepomuka kaj nekutime ĝi sin turnas al la preĝejo. De tie ĝi sekvas vojon preter tombejo direkten al arbarrando kaj trans roketo kun kruco prezentanta Kalvarion (eble el fino de la 17-a jc.) alkondukas pilgrimanton laŭ nova tilia aleo al kapelo de Bona Akvo, al loko de origina apero de la Virgulino Maria. Versio de la kapelo devenanta el la jaro 1730 sekvas konstrustilon de la pilgrimloko Klokoty. ■

**Pilgrimloko Klokoty kun gracia bildo de
Virgulino Maria de Klokoty**



La pilgrimloko Klokoty kun dekstre situanta spiritekzerca domo